

NORMANDA ESPERANTO BULTENO**ESPERANTO - NORMANDIE**

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine.
Tel. 02 35 34 28 78. LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.



PRELEGO de
ANNA LÖWENSTEIN :

« **Vivo en Romo antaŭ 2000 jaroj** »
Mardon 8an de majo. 18h30.
Maison des Associations,
10-18 Grand Parc,
14 200 Hérouville Saint Clair

Anna uzis siajn konojn por verki rimarkindajn romanojn en esperanto, « La ŝtona urbo » kaj « Morto de artisto », kies herooj evoluas en la antikva Romo. Ŝi prezentos bildojn por ilustrisian prelegon.

Post la prelego, ni kune vespermanĝos en la klubejo mem. Ĉiu alportu ĉu entreon, ĉu ĉefpladon aŭ deserton kiun ni kune (kaj bone) manĝos.

Merkredon 9an, je 8h45, ni vizitos kun ŝi la maketon de Romo, pli ol 70 m², en la Maison de la Recherche en Sciences Humaines, Université de Caen (3 € la vizito).

Por ambaŭ aranĝoj, bonvolu konfirmi vian ĉeeston al Gérard Sénécal : 06 89 74 26 65 aŭ gigesenecal@gmail.com

Anna Löwenstein estas britino loĝanta en Italujo ekde 1981. Ŝi estas verkisto kaj ĵurnalisto, aŭtoro de du historiaj romanoj *La ŝtona urbo* kaj *Morto de artisto*. Lastatempe ŝi interesiĝas pri landonomoj en Esperanto : ŝi redaktis la libreton *Rusoj loĝas en Rusujo*, verkis *Konciza klarigo pri la landonomoj*, kaj ankaŭ faris paroladon pri tiu temo spekteblan ĉe <http://vimeo.com/5030540>. Ŝi okupiĝas pri instruado al komencantoj per rekta metodo kaj kreas kursomaterialojn precipe por projekciado. Ŝi estas la verkinto de la listo de 1000 radikoj uzataj en la facila parto de *Kontakto* (kiun ŝi mem redaktis dum la 80aj jaroj). De kvar jaroj ŝi gvidas kurson por progresintoj en la virtuala mondo Dua Vivo. Krome ŝi estas la fondinto kaj organizanto de la Movada Foiro, kiu nun fariĝis regula programero dum la Universalaj Kongresoj. Ŝi estas sekretario de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo, kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Cotisation
2012



Une croix rouge dans cette case indique que vous n'êtes pas à jour de votre cotisation 2012. Merci d'envoyer votre règlement (8 €uros à l'ordre d'« Esperanto - Normandie ») à l'adresse indiquée ci-dessus. Merci pour votre soutien !

En tiu numero :

Ĝenerala Asembleo	2
Roman Dobrzynski	2
« Morala raporto »	3
Rodica Todor	4
Tradukrondo	4
Nia bulteno tra jaroj (9)	5
Pri « Lipogramo »	6

Por trovi facile la « **Maison des associations** » en Hérouville Saint Clair : **vidu paĝon 6an**

La 13an de majo, en Maison des associations, Hérouville

Ĝenerala Asembleo de Esperanto Normandie

10h00

Morala raporto
Financa raporto
Renovigo de la estraro
Normanda Esperanto Bulteno
Projektoj


12h30

Komuna tagmanĝo en "Maison des associations". Ĉiu alportu pladon kiun ni kune manĝos

15h00

Prelego de Roman Dobrzynski pri "La strato Zamenhof". Tre interesa, konversacie forma libro kun Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de esperanto, ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri lia vivo en la getto de Varsovio, pri lia profesio, ktp. Libro tre leginda, kaj legebla en esperanto kaj en la franca.

Por konfirmi vian partoprenon al la Ĝenerala Asembleo, bonvolu kontakti Yves Nicolas, 06 44 87 22 48 aŭ nicosibi@club-internet.fr



GRESILLON

Organizas aŭ gastigas kursojn, prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn en belega regiono. Disponas, krom ĉambroj, bibliotekon, libroservon, butikon, migradpadon, flugpilkejon kaj tenis-tablojn, kun 18-hektara parko.

Kulturdomo de Esperanto

Château de Grésillon
49150 Baugé

Tel : 09 51 64 10 34

kastelo@gresillon.org

www.gresillon.org

Lundon 14an de majo, 18h30 en Maison des associations, Hérouville

Prelego de **Roman Dobrzynski** pri "Sekretoj de la pola himno"

En la pola nacia himno oni kantas pri... Italio. Cetere ĝi ne estas serioza marŝo, taŭga por paradoj, sed frivola popoldanco, mazurko. Ĝia enhavo ne gloras la potencon aŭ belecon de Polujo, sed rememorigas, ke ĝi ankoraŭ ne pereis. Kiel okazis, ke la simpla, popola melodio transformiĝis en la ŝtatan himnon de Pollando kaj krome inspiris la aspirojn pri sendependiĝo de pluraj, aparte slavaj, popoloj?

Ni ĉeestis tiun prelegon en Bjalistoko dum tie kongreso de UEA en 2009 kaj garantias, ke ĝi estas tre interesa pro la nivelo de la preleganto sed ankaŭ pro tio, ke ni multe lernas pri la rilatoj inter la poloj kaj la francoj dum kaj post la franca revolucio.

Post la prelego, ni kune vespermanĝos en la klubejo mem. Ĉiu alportu ĉu entreon, ĉu ĉefpladon aŭ deserton kiun ni kune (kaj bonetose) manĝos.

Por konfirmi vian partoprenon al tiu aranĝo, bonvolu kontakti Yves Nicolas : 06 44 87 22 48 aŭ

nicosibi@club-internet.fr



Roman Dobrzyński (1937), elstara ĵurnalisto de la Pola Televido (1973 – 2007), specialiĝinta pri iberoamerikaj temoj, aŭtoro de multaj dokumentaj filmoj. En sia profesia kariero li ofte traktis Esperanton kaj multe kontribuis al popularigo de la internacia

lingvo, interalie realigante esperantlingvan version de la televida lingvokurso de BBC **Mazi en Gondolando**. Liaj 40 filmoj estas spekteblaj en Esperanto. "Japana Printempo – Oomoto 2009" gajnis la unuan premion en la Belarta Konkurso de UEA.

Roman Dobrzyński estas aŭtoro de pluraj libroj en la pola lingvo pri Hispanio Portugalio kaj Latin-Ameriko. En 2003 li publikigis sian unuan libron en Esperanto **La Zamenhof-strato**, kiu estis sekve tradukita en 16 lingvojn. Lia alia Esperanta furorlibro, estas "Bona Espero – idealo kaj realo", eldonita en 2008.

Roman Dobrzyński, longjara aktivulo de la Esperantomovado, estis i.a. prezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj kunorganizis la jubilean Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio (1987), ĝis nun la plej grandan en la historio de la lingvo internacia. En 1989-2001) li estis vicprezidanto de UEA, kiu nomis lin sia honora membro en 2005.

Karaj Normandanoj !

Nia normanda societo havas diskretan kaj modestan ekziston. Ĝi ne partoprenas vivon de naciaj asocioj aŭ federacioj kaj konsistas el tre malmultaj kluboj. En Seine-Maritime aktivas grupeto en Le Havre gvidata de **Sylvie Caron**. En Calvados bone fartas Esperanto Hérouville, gvidata de **Gérard Sénécal** (30 aliĝantoj). Ŝajne endormiĝis la grupo en Cherbourg, sed en suda parto de la departemento Manche aktivas kaj havas lernantojn **Christian Levesque** (St Michel des Loups) kaj **Jeanne Schertzer** (St Lô). Ĉu io en Orne ? Jes, ja! De kelkaj monatoj okazas kurso en Flers, gvidata de **Anne-Marie Leprevost**.

Plej bela floro en nia ĝardeno, restas la bulteno kiun rimarkinde efike kaj estetike redaktas Pierre Lemarchand. Ni povas konstati, ke iom post iom pli multe da homoj sendas tre diversajn artikolojn kiujn ilustras koloraj fotoj (por tiuj inter ni, fakte nun la plej multaj, kiuj povas legi la retan version de la bulteno).

En 2011, pluraj okazaĵoj arigis homojn de la tuta regiono por ĉeesti interesajn prelegojn kiujn organizis Esperanto Hérouville. **Pastro Mark**, el Abatejo de Bricquebec, humurplene kaj detale prezentis iom forgesitan sed tre gravan esperantiston kiu naskiĝis en proksima vilaĝo Néhou. Lanti estis malordinara homo, ribelema, kiu forte partoprenis la starigon de Sennacia Asocio Tutmonda. Li ankaŭ elstaris pro la kvalito de siaj verkoj kaj analizoj.

Partoprenis 45 homoj (parte de Manche, Orne kaj Seine-Maritime) la prelegon de **Trevor Steele** pri la aŭstralaj aboreĝinoj. Trevor prelegvojaĝis en Francio. Normandio havas gravan rolon en la preparo de tiuj turneoj.

En marto 2012, 4 samideanoj de Seine-Maritime kaj unu de Evreux vizitigis Rouen al **Rodica Todor ĵus** veninta por prelegvojaĝi en Francio pri Rumanio. Denove, samideanoj venis de Manche kaj Seine-Maritime por ĉeesti ŝian prelegon en Hérouville.

Jen naskiĝanta kutimo kiun ni flegu ! Ĉar dum la komuna vespermanĝo sekvanta la prelegon okazas fruktodonaj kontaktoj inter la anoj de nia regiono, stariĝas helpo de klubo al klubo, kaj konstruiĝas novaj ligoj kaj solidaroj. Ni esperas, ke baldaŭ ne



nur Esperanto Hérouville proponos tiajn aranĝojn, tre utilajn por reklami kaj ankaŭ por firmigi grupon.

Cetere, majo 2012 estos tre interesa monato. Mi esperas, ke vi venos multnombre por renkonti **Anna Löwenstein**, kaj kelkajn tagojn poste **Roman Dobrzynski**. Ili estas tre famaj en esperantujo kiel verkistoj kaj movadestroj. Ili pritraktos malsamajn temojn kiuj tutcerte kaptos vian atenton.

Dum la restado de Roman Dobrzynski, la **13an de majo**, okazos nia **Ĝenerala Asembleo**. Jen grandaj vortoj por afero ete eta! Ni nur iom babilados pri niaj financoj, pri la nuna situacio kaj ni eventuale antaŭvidos projektojn (vidu la tagordon). La plej grava afero estas, ke ni kune pasigu agrablan momenton en internacia etoso, ke ni revenu poste en niajn lokajn grupojn kun nova energio por ilin firmigi kaj grandigi.

Yves NICOLAS



Desegno de Peter Oliver por Esperanto-Asocio de Britio por celebrado de la 125a datreveno de la apero de Esperanto en 2012.

Survoje, de Beauvais ĝis Caen, **Rodica Todor** haltis la 11an de marto en Rouen kiun ŝi vizitis kun lokaj esperantistoj : Pierre Quillaud, Pierre Lemarchand kaj Suzanne Helbert kun sia edzo. Ankaŭ partoprenis tiun viziton Barthélémy Maurau (Evreux), Jean-Pierre Sauvage kaj Yves Nicolas (grupo de Hérouville).

Ŝian prelegon en Hérouville partoprenis 29 homoj, inter ili Alain Chalm kaj Jean Colombel (Le Havre), kaj Christian Levesque (Manche) kun lernantino. Aperis tri artikoloj en Ouest-France pri la prelego kaj ankaŭ pri la fota ekspozicio de Catherine Nicolas-Gautier, dum du semajnoj en « Maison des associations », pri la vivo de Tsiganoj en Rumanio.



Rodica Todor interkonatiĝas kun Pierre Quillaud sur placo de la Ruena Katedralo; duavice estas gesinjoroj Nicolas-Gautier, Helbert, Nicolas, Sauvage, Maurau.

KVINPETALO



Organizas staĝojn por instrui Esperanton kaj pri diversaj aspektoj de la Esperanta kulturo (historio de la movado literaturo ktp) kaj ankaŭ staĝojn pri diversaj fakoj (ornitologio, joko, trikado, muziko, astronomio, piedmigrado, botaniko, ktp) per Esperanto.



Kvinpetalo Esperanto Centro

15 rue du Lavoir 86410 Bouresse

Tel : 05 49 03 43 14 - 06 07 31 67 81

informoj@kvinpetalo.org - www.kvinpetalo.org

Normandanoj **partoprenas tradukrondon**

En oktobro 2011, Trevor Steele (Aŭstraliano) vizitis 7 urbojn kadre de sia prelevojaĝo por Esperanto France. Jean Colombel kaj mi venis de Le Havre por lin aŭskulti en Hérouville Saint Clair. Multe interesis nin lia prelego pri la aborigenoj. Trevor Steele instruis dum unu jaro kaj duono en aborigena vilaĝo kaj verkis romanon pri la konflikto inter la aborigenoj kaj la eŭropanoj kiuj invadis la kontinenton.

Post la turneo naskiĝis la ideo francigi tiun romanon, «Flugi kun kakatuoj». Ĉefrolas en la afero Ginette Martin (Gérardmer) kiu jam tradukis «Strato Zamenhof» de Roman Dobrzynski kun aliaj tradukantoj.

Denove, pere de la reto de Esperanto France, Ginette sukcesis arigi dekon da volontuloj por traduki la romanon de Trevor Steele. Ĉiu tradukanto francigas ĉapitron. Ginette korektas tiun unuan tradukon kiun ŝi poste denove sendas al la tradukrondo por plia polurado.

Inter la tradukantoj estas du normandanoj, Alain Chalm kaj Yves Nicolas. Venas homoj de tre diversaj regionoj, profesioj, aĝoj, ktp, kiuj sin prezentis en retaj mesaĝoj por ke la komuna laboro ne restu anonima.

Ni esperas eldonon de la libro fine de 2012.

Mi opinias tiun sperton vere interesa ĉar tro ofte homoj lernas lingvon sen posta uzado. Partopreno al tradukrondo, jen fruktodona praktikado !

Ni praktiku la lingvon. Mi memoras, ke kiam mi eklernis esperanton en la sesdekaj jaroj mi aĉetis multekostan radioaparaton por aŭskulti plurajn radiojn : Vatikano, Berno, Pekino, ktp. Radio Varsovio vere instruis min pri la parola esperanto. Nun la posedantoj de komputiloj povas tre facile aliri radiajn retpaĝojn, ĝenerale sone tre bonkvalitaj kaj aŭskulteblaj iam ajn. Ekzemple : Radio Verda, Muzaiko, Kubo, Ĉinio, ktp. Tajpu « radio en esperanto » en Google.

Alain CHALM (Le Havre)

Bulteno : n° 147a vintro 1983. <i>En la N° 247a estis eraro en la tabelo, la n°143/144a kaj 145/146a ne aperis en 1981 sed en 1982.</i>	8 paĝa + 7 paĝa suple- mento	Komitataj kunvenoj en Yvetot, Le Havre, Grand Quevilly, Le Havre. Normanda bulteno sendita al 57 adresoj en Calvados, 27 en Eure, 10 en Manche, 12 en Orne, 118 en Seine Maritime, al 12 francaj urboj, 5 adresoj el 4 landoj, al 25 E° Asocioj, al 10 ne esesperantistaj organismoj. Entute 276 bultenoj. Artikoloj de Sino Boniol, Sro Legret, Quillaud (Leningrado). Grupaj vivoj en Le Havre, Rouen Domfront, Yvetot. Argumenta 7 paĝa suplemento « La communication, les problèmes linguistiques dans les relations inter-peuples ».
n° 148a printempo 1984.	5 paĝa	Sro Gibaux tajpas la stencilojn. Aliĝilo por kunveno en Caen (25an de marto). Grupa vivo en Yvetot, Le Havre, Caen.
n° 149a somero 1984.	4 paĝa	Aliĝilo por Ĝenerala Kunveno en Bayeux 6an -7an de oktobro.
n° 150a aŭtuno 1984.	6 paĝa	Tra Normandio per biciklo (Yves Nicolas). Grupa vivo en Rouen (40 spektantoj por « Babel aujourd'hui » teatraĵo en la M.J.C., Caen (24 parteprenintoj la 25 de marto), Le Havre, Les Andelys, Domfront-Flers. Estrarkunvenoj en Ver sur Mer, Grand Quevilly. Sro Bettencourt kompilas la adresojn + eldonas la adresetiketojn, Sro Gibaux redaktas, P. Lemarchand zorgas pri la presado + sendado.
n° 151a printempo 1985.	9 paĝa	Ĝenerala Kunveno en Bayeux, raporto. Estrarkunveno en Lisieux 15an de decembro. Prezidanto P. Quillaud, Sekretariino Sylvie Caron, Kasisto P; Lemarchand, Helpkasisto P. Michel, Junularfako Y. Nicolas, Bultenistoj P. Pottier, C. Domingo. Estrarkunveno en Yvetot 27an de Aprilo. Vivo de la grupoj en Le Havre, Bayeux, Caen, Hérouville St Clair, Les Andelys, Yvetot, Domfront. Forpaso de Sino Andrée Rault en Lisieux. Venonta kongreso en Perrou apud Domfront.
n° 152a vintro 1985.	20 paĝa	Nova formato : A5, 15x21 cm. Ne plu estas verda frontpaĝo, nova vinjeto desegnita de P. Michel. La paĝoj estas fotokopiitaj. Redaktas Annie Gaillard. Presas + Sendas P. Lemarchand. Vivo en Le Havre (J. Gibaux) , Bayeux (C. Rouget), Vire (Legret), Rouen (Lemarchand), Yvetot (P.Pottier) Ĝenerala Kunveno en Domfront. Artikoloj de C. Rouget Kongreso de Jefe, Junulkunveno en Mont St Michel 7an - 11an de majo. Rememoroj pri la 70a U.K. en Aŭgsburgo (F. Tailpied). Ruena grupa faldfolio « Et si nous parlions l'E° ». Artikoloj pri JEFO + Pasporta Servo, Pri CDELI La Chaux de Fonds (P;Dubourg). Résolution UNESCO pri E°Sofia 1 985. Statut de l'enseignement de l'E°en France.
n° 153a -154a somero 1985.	24 paĝa	Raporto pri Domfront kunveno, elektita komitato Gesoj Quillaud, Pottier, Lemarchand, Rouget, Domingo, Caron, Gaillard. Grupa vivo en Le Havre, Lisieux, Vire, Rouen. Kunveno en Port-Bail aliĝilo. 79a kongreso de UFE St Raphaël (Sro Loisel). Artikoloj pri Beaumont la Hague, St Sauveur le Vicomte, Nez de Jobourg, Kvinpetalo, KCE La Chaux de Fonds, E°Turism Turkio, Serio « Orient-Occident », E°en radio, l'Unesco kaj UEA. Afiŝo : « l'E°vous connaissez ? »
n° 155a - 156a vintro 1986.	16 paĝa +faldfolio	Ĝenerala Kunveno en Port Bail. Estraro : Prezidanto P. Pottier, Vicprezidanto P. Quillaud + kasisto, Sekretariino S. Caron, Junuloj Y. Nicolas, Bultenisto A. Gaillard, Membroj : P. Michel, C. Rouget, D. Domingo, R. Delaunay. Grupa vivo Calvados, Yvetot. Artikoloj Norvegio, Oslo (C. Rouget), Port Bail (P. Robiulle). Forpasis Sino Micard en Caen. Sejna E°Rendevuo en Tro yes.. Recommendations, résolutions propositions en faveur de l'enseignement de l'E°. Faldfolio « Stages E° » en MJC de Rouen 1987.
n° 157a printempo 1987.	12 paĝa	Semajnfino en Houlgate 3a - 4a de oktobro. Grupa vivo en Rouen, Le Havre, Grand Quevilly. Ekskurso tra Pays d'Auge. Feriaj studoj en KCE La Chaux de Fonds. Nova redaktoro : Y. Nicolas.
n° 158a somero 1987.	12 paĝa	Grupa vivo en Calvados, Yvetot, Le Havre. Aliĝilo Houlgate. Fabelo de F. Szilágyi UFE kongresis (A. Loisel) 1987 : E°centjara, UNE 40 ja ra. Listo de « ŝlosilaj personoj. ». Kastelo Grésillon. 183 bultenoj senditaj ĉiunumere. Afiŝo « cours par correspondance », ruena grupo.
n° 159a aŭtuno 1987.	8 paĝa + fadfolio	Raporto + rezolucio, kongreso en Houlgate (Angenault). Nova abonkotizo : 45,00 Fr. Vivo en Yvetot, Le Havre. Artikolo (F. Tailpied) Fervojmuzeo en Norvegio. Poŝtmarkoj pri Normandio.. Faldfolio staĝoj en MJC de Rouen 1988, 2 paĝa.
n° 160a vintro 1987.	12 paĝa	Vivo en Yvetot, Rouen, Caen, Hérouville, Le Havre. 12an - 13an de marto 1988 rendez-vous normand de l'E°en Rouen. Staĝoj en Bouresse. 80a kongreso de UFE en Rouen 20an - 24an de majo 1988.



PRI « LIPOGRAMO »

La vorto « lipogramo » ne estas en la esperanta Plena Ilustrita Vortaro (PIV) ; estas ... manko En la franca, « lipogramme » estas teksto en kiu oni plenvole sisteme rifuzis uzi difinitan literon. Tiel, « un lipogramme en F » estos teksto en kiu neniam aperos la litero F. Je unua vido, oni povus kredi ke la vorto havas rilaton kun la grasaj substancoj, la lipidoj, pro proksimeco kun « liposuccion », « liposoluble », ktp... Sed tiel ne estas. La vorto fontas el la greka « leipo = laisser, manquer, faire défaut » kaj « gramma = skribita teksto ». Do se esperanto volus enkonduki la vorton, eble ni povus proponi « lejpogramo » anstataŭ « lipogramo » por ne riski erarigi.

La franca verkisto Georges Perec skribis tutan romanon, titolitan « La disparition », kiu estas lipogramo je E, kvankam E estas la plej uzita litero en la franca. Kaj povas ekzisti lipogramoj je pluraj literoj ! Mi kopias sube kiel ekzemplo, ekstrakton de « La disparition », troveblan en interreto.

« Anton Voyl n'arrivait pas à dormir. Il alluma. Son Jaz marquait minuit vingt. Il poussa un profond soupir, s'assit dans son lit, s'appuyant sur son polochon. Il prit un roman, il l'ouvrit, il lut ; mais il n'y saisissait qu'un imbroglio confus, il butait à tout instant sur un mot dont il ignorait la signification.


Il abandonna son roman sur son lit. Il alla à son lavabo ; il mouilla un gant qu'il passa sur son front, sur son cou.

Son pouls battait trop fort. Il avait chaud. Il ouvrit son vasistas, scruta la nuit. Il faisait doux. Un bruit indistinct montait du faubourg. Un carillon, plus lourd qu'un glas, plus sourd qu'un tocsin, plus profond qu'un bourdon, non loin, sonna trois coups. Du canal Saint Martin un clapotis plaintif signalait un chaland qui passait. »

Estas mirinde konstati kiagrade tiu teksto aperas ordinara ; se oni tiun submetus por legado al neavertita persono, kaj same estus por la tuta romano, estus dubinde ke la demandita persono rimarku kion ajn. Oni povas sin demandi je kio povas utili tia intelekta ludo, tia prodfaro, en la franca lingvo. Sed en esperanto ?

Tajpante tekston en la zamenhofa lingvo, oni ofte bufrumas je kvin supersignitaj literoj kiujn oni ne povas rekte tajpi per simpla gesto sur la klavaro, kiel oni povas fari por la 23 aliaj literoj. (Mi ja diris kvin literoj, kaj ne ses, tial ke la U-konsonanto povas esti anstataŭtita per ŭ, rekte tajpebla. Do en esperanto, oni devus redakti lipograme je la supersignitaj literoj, se oni ne volas mane skribi sed uzi skribaparaton, kaj se oni ne majstras la diversajn teknikojn kiuj eblvvvrigas obteni la koncernitajn literojn. Laŭ via opinio, tia kripligo de la lingvo estas realigebla ?

Henri ROUSSEAU



Kiel atingi :

« MAISON des ASSOCIATIONS »
10 - 18 Boulevard Grand Parc
14200 HEROUVILLE SAINT CLAIR